


### **DEKLAMADO DE POEZIO EN ESPERANTO**

Okaze de granda kulturfesto en la kvartalo San Fermín, oni programis por la venonta 24-a de aprilo publikan deklamadon de poemoj en Esperanto. La agado disvolviĝos en granda malferma spaco en la Avenuo San Fermín, fronte al la Sanitara Centro, metrostacio San Fermín-Orcasur.

La agado rilatas al la lukto de la kvartalaj asocioj, por ke oni konstruu publikan bibliotekon en tiu areo. Jam dum pasinta jaro okazis kunlaboro de esperantistoj, kaj ĉijare oni denove invitis nin por la Tago de la Libro.

En tiu ĉi jaro, oni profitos la aperon en januaro de la libro "Nova mondo en niaj koroj", antologio de hispana nuntempa soci-kritika poezio, en traduko al Esperanto de la poeto Miguel Fernández. La kompilinto de la poemoj estas neesperantisto, juna doktoro pri hispana filologio Alberto García-Teresa, kiu pretigis kaj prologis kolekton el 60 engaĝigintaj poemoj verkitaj de 20 el la plej prestiĝaj hispanaj nuntempaj bardoj, al kiuj li aldonis 8 poemojn el tri esperantlingvaj poetoj: Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández. La libron produktis neesperanta hispana eldonejo, *Calúmnia*, kiu per ĝi iniciatas kolekton, nomatan *Revo lucida*, de esperantlingva engaĝiginta literaturo je bona prezo. En tiu projekto ĝi ricevas la kunlaboron de SATeH (SAT en Hispanio)



Do, ĉijare en San Fermín oni planas la deklamadon de poemoj de tiu libro, dulingve. Oni antaŭvidas la ĉeeston de la kompilinto kaj de kelkaj el la antologiitoj, poetoj unuarangaj kiel María Ángeles Maeso, Jorge Riechmann, Antonio Crespo Massieu... kiuj tiamaniere manifestos sian apogon al Esperanto kaj al la konstruo de la menciita biblioteko, kaj memevidente ankaŭ de la tradukinto kaj aliaj esperantistaj kunlaborintoj.

La deklamado komenciĝos ĉirkaŭ la 12-a matene, kaj tiu parto daŭros ĉirkaŭ 40 minutoj. Dum la tuta mateno okazos aliaj kulturaj aktivajoj. Krome, eblos aĉeti ekzemplerojn de la verko kaj de aliaj libroj en Esperanto.

### **LEGADO DE DONKIĤOTO**

Kiel jam tradicie, fine de aprilo okazos la publika legado de Donkiĥoto en kulturinstitucio *Círculo de Bellas Artes*.

Ankaŭ esperantistoj partoprenos, la sabaton 23-an de aprilo je la 6-a vespere, per laŭtlegado de kelkaj paragrafoj de la verko en Esperanto. Volontuloj sin anoncu al nia redakcio, por rezervi la vicon por tiu tre interesa kaj jam tradicia aktivado.

### **PUBLIKA PREZENTADO DE BOHEMIAJ LUMOJ**

Kiel ni jam informis en la pasinta numero de "Nia Voĉo", la pasintan 19-an de marto estis publike prezentita al la ĝenerala publiko la traduko al Esperanto de la verko de Ramón M<sup>a</sup> del Valle-Inclán, "Bohemiaj Lumoj".

La prezentado okazis en la teatrejo Kubik Fabrik, spaco alternativa kaj moderna en la kvartalo Usera. La salono pleniĝis per interesita publiko.

La aranĝo konsistis el prezento de la libro, fare de ties tradukisto, nia samklubano Miguel Fernández, kiu estis prezentita de Mati Montero. Poste okazis aktorita leg-prezentado de ĝia dek-dua sceno. Rolis en la prezento:

- Makso: Miguel Fernández
- Sinjoro Latino: Jorge Camacho
- Najbarino: Ana Manero
- Pordistino: Matilde Montero
- Rakontanto: Felix Jiménez Lobo



La tuta sesio estis filmita, kaj oni povas ĝin spekti en la jutuba kanalo de MEL <https://www.youtube.com/watch?v=fPE7d935pDE>.

## **HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ AMO-SEMINARIO**

Inter la 29-a de junio kaj 1-a de julio 2016, parte paralele al la 75-a Hispana Esperanto-Kongreso, Herrera del Duque gastigos tritagan AMO-seminaron, t.e. Seminario por Aktivula Maturigo, kiu estas iniciato de UEA jam celebrita en pluraj landoj de la mondo por trejni aktivulojn kaj por organizi kunan laboron. La elektita temo, aparte grava por nia Movado, estos rilata al informado: "Aktualaj eblecoj por disvastigi Esperanton". Kunordigos la seminarion José Antonio de Barrio, prezidanto de HEF, kaj José María Salguero, sekretario de la Loka Kongresa Komitato; ĝin inaŭguros Sara Spanò, respondeculo de UEA pri tiu aktivado.

Dume, jam pli ol 125 homoj aliĝis al la Kongreso. Ne hezitu mem fari. Memoru ke oni planas organizi komunan transporton al Herrera del Duque, el Madrido, por la AMO-seminario kaj por la komenco de la Kongreso mem, la 30-an de junio posttagmeze.

## **ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE HEF**

La 17-an de aprilo (dimanĉe), je la 10:30 horo, okazos Ordinara Ĝenerala Kunsido de Hispana Esperanto-Federacio, en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro, 13, de Madrido.

Tre gravas ke la membroj de HEF partoprenu aŭ sendu sian reprezentigon. Ĉiukaze, oni antaŭvidas la celebron de dua ĝenerala kunveno tiun ĉi jaron, la 3-an de julio, dum la Kongreso de Herrera del Duque, por plifaciligi la ĉeeston de pli da anoj.

## **KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30.

La sabata babilado okazos ĉimonate la duan sabaton, nome la 9-an de aprilo, je la 6-a vespere, en la kafejo VIPS de la t.n. Kuboplaco (komenco de str. Princesa, metroo Plaza de España).

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, la liston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrid/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/). En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)